

Ni aŭskultu Denis de Rougemont, 4-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 763, 1978.05.25 & 27

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Tipa trajto propra al la svisa literaturo estas la intereso pri la funkciado de la ŝtato kaj pri la limigo de ĝia povo. Tiurilate la verkisto **Denis de Rougemont** estas tipe svisa. Lia tuta libro *L'Avenir est notre affaire* (Estonteco estas nia afero) pledas kontraŭ la senĉese kreskanta potenco de niaj Naci-Ŝtatoj kaj por konstruo de Eŭropo bazita sur la federigo de regionoj. Ni dediĉos plurajn prelegojn al tiu ĉi temo, ĉar ni opinias, ke la kritikoj kaj proponoj de Denis de Rougemont estas pravaj kaj pozitivaj.

A.- Por Denis de Rougemont, (ni traduke citas) : « La Naci-Ŝtato ne povas kaj ne devas plu daŭri longtempe, ĉar ĝi montriĝas ĉiujare kun kreskanta evidenteco nekapabla taŭge pritrakti eĉ nur unu el la ĉefaj problemoj de nia socio. » (p. 115.)

Cl.- Kiel ekzemplojn Denis de Rougemont listigas la demandojn pri « energio, mono, inflacio, ĉirkaŭaĵo, marprotektado kaj helpo al la tria mondo. » (p. 115.)

A.- « La Naci-Ŝtato reprezentas la ĉefan obstaklon al la solvo de tiuj ĉi problemoj, ... inter kiuj neniu koincidas kun la ŝtatlimoj. ... Ĉiuj trovotaj solvoj estas aŭ supernaciaj aŭ regionaj. ... » (p. 94.)

Cl.- La Naci-Ŝtatoj respondecas pri tiuj hodiaŭaj problemoj, kiuj pli kaj pli akriĝas, « ili administris kaj detruis (la Terajn) riĉofontojn celante nur la propran potencon kaj nur la propran prestiĝon cele al milito-preparo, kiu ilin naskis. » (p. 90.)

A.- Tiam **Denis de Rougemont** serĉas interven-vojon por la civitanoj, por permesi al ili neperfortan lukton kontraŭ la Ŝtatoj, kies potenco senĉese kreskas, servutigante siajn anojn. Lia analizo de la universala Krizo lin revenigas senĉese « al dilemo timige simpla :

Cl.- - aŭ la Naci-Ŝtato konservas aŭ eĉ kreskigas siajn pretendojn je la ekskluziva administrado de la Tero, kaj tiam nur la kalkuloj la plej katastrofaj havas la ŝancon konfirmiĝi;

A.- - aŭ la Naci-Ŝtato iom post iom malfortiĝos. Homoj aŭ homgrupoj decidas reokupiĝi pri la propra destino, tio je la loka kaj regiona niveloj, kaj decidas, ke regos la ĝenerala intereso surper tiu de la Naci-Ŝtatoj. Tiam la ludo refunkcias, la estonteco refariĝas nia afero. ... » (p. 96.)

Cl.- Kiel elirejo el tiu ĉi Naci-Ŝtata sistemo kriziga **Denis de Rougemont** proponas la formadon de mem-administraj regionaj komunumoj ĉesantaj sin apogi sur la Naci-Ŝtatoj. Ĉiu alia rezisto ŝajnas al li nepre venkota de la tro potenca Naci-Ŝtato. Rekta rezisto kontraŭ la militemo naci-ŝtata estas neebla. Eĉ lukto kontraŭ la industriaj progresoj fariĝas vana en la kadro de naci-ŝtato, kiu bezonas maŝinojn por la asekuro de la propra defendo. Kaj perforta revolucio povas nur konduki, okaze de malvenko aŭ de venko, al la plifortigo de la Povo. Jen la solvo proponita de Denis de Rougemont. Ni traduke citas :

A.- « La Povo estas ligita al la milito, kaj se Socio volas limigi la milit-detruojn, ne ekzistas por ĝi aliaj rimedoj, ol limigi la kapablojn de la Povo. Tiu ĉi brila mallongigo montras al mi la

interven-punkton, kiun mi serĉis : limigi la kapablojn de la Povo, jen kio ŝajnas al mi fine ebla per la rimedo de konstrua rezistado praktikata laŭ dimensioj, kie la persona agado reakiras signifon.

Cl.- La etaj federigintaj povoj fakte sole kapablas venki la pli altan Povon. [...] Kontraŭ la ekscesoj de la ŝtataj povoj oni povas efike interveni, kiam oni povas naski grupon aŭ alporti al ĝi sian aktivan helpon. Ni disponas, ni, civitanoj, kiuj volas refariĝi responsaj, je povo, kiun la Ŝtato oficiale malestimas kaj tamen sekrete timas [...] : la povo de la grupetoj multiĝantaj kaj de la civitana iniciato neatendita, [...] spontana kaj nekondiĉita, neantaŭvidebla de niaj balotaj reĝimoj.

A.- La lukto de etaj komunumoj naskiĝantaj por mem-administrado regiona. [...] fariĝos la sola konkreta espero de la popoloj, kiujn la ĝenerala Krizo ne estos ĵetinta en totalecajn pun-reĝimojn.

Cl.- Mi bone diras, daŭrigas Denis de Rougemont, ke temas pri lukto kaj keado malgraŭ la Naci-Ŝtaton ne kontraŭ ĝi : ĉar ĝia disfalo povus hodiaŭ nur frakasi multajn homojn pro manko de adapteblaj strukturoj eksteraj al la sistemo. Temas senprokraste krei ion alian, semi, planti, ekformi vivantajn ligojn ; elabori novan soci-modelon fonditan sur novaj baz-unuoj kaj sur novaj lig-tipoj komunumaj, vivante unue kaj anticipe tiun eksperimenton en ni mem.

A.- Iniciati, senprokraste inventi, sen atendi la datfalojn, kiujn la ŝtatoj kaj ties fakularo senespere provas prokrasti. » (p. 112.)

Cl.- La venontan semajnon ni ekzamenos per praktikaj ekzemploj, kio povos esti tiuj ĉi komunumoj mem-administraj, kiujn Denis de Rougemont proponas por iom post iom limigi la tutpovecon de la Naci-Ŝtatoj.

A.- Kaj jen, por konkludi nian elsendon, ni malfermas nian leterujon.

Cl.- Sinjoro Norbert Merkens en Wuppertahl, Germanio federacia ŝatis nian serion de intervjuoj kun sinjoro Claude Piron kaj opinias, ke el muzika vidpunkto en la kantoj, kiujn li tradukis la slavaj ritmoj ne sufiĉe klare estis redonitaj. Ni havos la okazon re-intervjui la poeton Claude Piron, kiu verkas sub la pseudonomo Johán Valano kaj ni transdonas al li la koncernan kritikon.

A.- Gesinjoroj Alice kaj Walter Peek en York, Britio tre ŝatis la kantojn, kiujn ni aŭdigis post nia elsendo. Ni memorigas ke la titolo de la koncerna disko estas *Tra l' mondo*, kaj ke la kantisto nomiĝas Olivier Tzaut.

Cl.- Paul Thomas en Aurbach, Germanio demokrata ŝatis nian raporton pri la libro *Bon voisinage* kiu koncernis korespondadon inter Edmond Privat kaj Romain Rolland. Tiu ĉi libro aperis la pasintan jaron ĉe Albin Michel, Paris, kaj La Baconnière, Neuchâtel. Ĝi povas esti aĉetita tra la kanalo de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, aŭ Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam. Sinjoro Paul Thomas skribis : « tute modeste, sed tamen kuraĝe kaj persiste ni ripetas niajn ĝisnunajn oftajn petojn ke vi sendu al ni vian programon. Vi scias kion skribis Zamenhof : « Eĉ guto malgranda konstante frapante traboras la monton granitan ». Do ankaŭ mi daŭrigos pacience mian konstantan frapadon en la espero ke fine mi sukcesos trabori la monton granitan de via obstina silentado. » Respondis al ni radiosekretario : la programo estis ofte sendita sed ŝajne ĝi ne alvenas en Germanio demokrata. Ni aldonos, ke bedaŭrinde en multajn landojn niaj presaĵoj malfacile penetras.

Ĉiuj leter- aŭ poŝtkarto-skribantoj regule ricevas nian radioprogramon, kiun nia radio presaje sendas okaze de reeldono.

A.- Prelegis el Svislando gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012*